



VT 42 - MARS 2017

la verda Triskelo

esperanto
Bretagne



2 numéros par an, parution :
Printemps-Automne

Le 12 MARS
Assemblée Générale
à
LOUDEAC
(voir pages 3, 4 et 5)

Legu pri la
okazontaĵoj
Agenda au verso

PRINTEMPAS kaj AMO
14-22 aprilo en Gresillon
Por lerni kaj por lerni instrui E-on!

Les rencontres internationales
de PLOUEZEC
du 14 au 20 août 2017
Même pour les tout-débutants et
les enfants !

Enhavo

• <i>Edito</i>	p. 2
• <i>La Federacio</i>	p. 3,4
• <i>Prelego de Guilherme</i>	p.5
• <i>Esperanto-Vannes</i>	p.6
• <i>La pomoj</i>	p.7
• <i>Armor esperanto Pluezek</i>	p. 8
• <i>Bretona humuraĵo</i>	p. 9
• <i>Rakontoj</i>	p.10,11
• <i>Historio</i>	p.12,13
• <i>Eo klubo de Hennebont</i>	p.14,15
• <i>Teatraĵo</i>	p. 16
• <i>En Rennes</i>	p.17
• <i>Bela Rhuys</i>	p.18,19
• <i>Agendo</i>	p.20

Cotisation 2017

y avez-vous pensé ?

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif,
soutenez l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous appartenez à un club, pour ad-
hérer à la fédération uniquement adressez-
vous à Xavier Godivier, *coordonnées p.2.*

Aux internautes

Site Internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org/>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio, et ainsi recevoir des nouvelles, plus
fraîches et plus nombreuses, envoyez un
message vide à l'adresse :

bretonio-subscribe@yahoogroupes.fr

E D I T O

Mi, vi, ni agas plej bone por Esperanto

Post mia reveno de miaj "ferioj", plej parte dediĉitaj al la forpaso de mia patro, mi malkovras ke la raporto de kluboj ne pretas por la membrokunveno kaj ke ni ne sukcesis pro tio peti la subvencion de Rennes. Mi komprenas ke vi povas senti vin malbone pri tio, pri tiu manko de organizado kaj manko de agado por nia asocio kaj por Esperanto. Jes tia estas la situacio.

Ĉu indas pro tio kulpigi iun aŭ alian de la komitatajnoj? Ĉu indas grumbli, koleri aŭ plori pri tio? Mi tute kontraŭas tiajn reagojn kiuj nur povas forfuĝigi kaj pli ŝrumpigi la magran aktivularon kiun ni havas, sen espero anstataŭi ĝin de novaj pli agemaj aktivuloj kiuj ne sufiĉe aperas, nek en niaj lokaj asocioj nek en nia federacio.

Niaj asocioj, internaciaj, naciaj, regionaj kaj lokaj malbonstatas rilate al nombro de membroj kaj krom kelkaj veraj sukcesoj tie kaj ĉi tie, ni ja estu klarvidantaj pri la aktuala malforto de nia movado.

Sed ni rigardu al la bonaj flankoj. Kontraste al nia maljuna asocia movado kiu malbonfartas, la celo de nia movado, nia lingvo Esperanto pli kaj pli bonfartas. Esperanto estas pli kaj pli forta kaj videbla en Interreto kaj pro la forto de Interreto en nia aktuala

socio, Esperanto fariĝas do pli kaj pli videbla en la mondo.

Por ni kiuj vivas Esperanton en la reala vivo, tio povas aspekti abstrakta kaj eble sen reala estonteco. Mi pensas tute male ke kio okazas nuntempe en Interreto estas nur ĝermo. Ĝermo de nova movado kiu baldaŭ anstataŭos nian aktualan movadon.

En 1994 mi mem estis nur tia ĝermanta "interreta" esperantisto. Necesis 4 jaroj antaŭ ke mi fariĝu "reala" esperantisto kaj kelkaj pliaj jaroj antaŭ ke mi fariĝu aktivulo de nia movado. Imagu... en 1994 Interreto estis nur naskiĝanta kaj ni estis ege malmultaj tiaj ĝermoj sed hodiaŭ ili estas multege pli kaj tiuj aktualaj ĝermoj alportos do multege dum la sekvaj jaroj.

Ni ne timu por la estonteco de Esperanto kaj ni do ne timu pro la aktuala malforto de nia movado. Tio estas nur malagrabla fazo antaŭ sendube bela estonteco por nia kara lingvo. Kaj intertempe mi, vi, ni agas plej bone kiel ni povas por Esperanto.

Xavier Godivier, prezidanto de la Federacio Esperanto-Bretonio

Responsables des clubs (ou antennes) bretons

VT sendado	Manjo Clopeau	02.97.68.98.57	manjo.clopeau[ĉe]gmail.com
Armor-Eo (St Brieuc)	12 rue de la Drisse 56450 Theix		
Armor-Eo (St Brieuc)	J�rome Car�	07.82.19.62.71	armor-esperanto[ĉe]mailoo.org
Dinan	Philippe Stride	02.96.27.87.43	philippe.stride[ĉe]gmail.com
Guingamp	Anne Desormeaux	02.96.35.83.25	anne_desormeaux[ĉe]yahoo.fr
Hennebont	Yvette Veslin	02.97.36.08.75	yvette.veslin[ĉe]orange.fr
Landerneau	Yves Royou	02 98 85 23 62	yves.royou[ĉe]orange.fr
Lorient	Anne Georget	02.97.64.30.39	anne.georget[ĉe]wanadoo.fr
Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	02.99.09.71.92	jpducloy[ĉe]club-internet.fr
Morlaix	Nicole Rizzoni	02.98.88.62.57	nicole.rizzoni[ĉe]wanadoo.fr
Peumerit-Quintin	Alain Bournel	06.64.35.06.71	bournel.alain[ĉe]orange.fr
Plou�zec	Jeanne Pouhaer	02 96 20 68 07	jeanne.pouhaer[ĉe]orange.fr
Pontivy	Marielle Giraud	02.97.27.76.98	liber.terre[ĉe]wanadoo.fr
Rennes	Xavier Godivier	09.53.17.02.55	zav[ĉe]esperanto-panorama.net
Rhuys	Francis Desmares	02.97.26.89.96	sicnarf56[ĉe]free.fr
St Quay Perros	Gaby Tr�anton	02.96.23.02.63	gaby.treanton[ĉe]wanadoo.fr
St Malo	A-Marie Argney	02.99.40.24.86	amargney[ĉe]wanadoo.fr
Vannes	Elisabeth Le Dru	06.21.07.11.09	ledruelisabeth[ĉe]gmail.com
Nantes	Lucette Echapp�	02.40.04.46.02	sabato[ĉe]live.fr
Herbignac	J-Y Santerre (Duret)	02.40.88.96.98	jys.mys[ĉe]club-internet.fr
Saint Aignan de Grand lieu	Solange Goan	02.40.31.02.56	sgoan[ĉe]club-internet.fr
St Nazaire	Chantal Barret	02.40.01.97.27	patchdomo[ĉe]yahoo.fr

F e d e r a c i o

**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE
DU DIMANCHE 12 MARS 2017**
de 9h00 à 16h30 à la salle Malivel de Loudéac

Rappel de l'ordre du jour:

9h00 Accueil
9h30 – 10h30 mot du président , approbation des rapports d'activité et financier 2015, **élection tiers sortant du CA**
10h30-12h30 présentation des actions locales créatives
12h30 Repas,
13h30 temps libre
15h - 16h30 conférence de Svetlana Svetanina

Libroservo toute la journée

Rapport d'activités 2016(année civile)

Un concours de circonstances a fait que le comité d'administration a disfonctionné ces dernières semaines et n'a pas finalisé à temps le compte-rendu pour qu'il apparaisse complet dans ce numéro du Verda Triskelo. Nous vous prions de nous en excuser et donnons ci-dessous les éléments déjà réunis. Nous compléterons pendant notre réunion le rapport, en particulier sur les activités des clubs. Par manque de temps nous avons laissé certaines parties en espéranto alors qu'habituellement nous réalisons l'ensemble en français.

La Fédération regroupe 18 groupes locaux, dont certains sont eux-mêmes regroupés au sein d'associations départementales, dans les villes suivantes :

• **Côtes d'Armor** : St Brieuc, St Quay-Perros, Lannion, Trédez-Loquemeau, Guingamp, Dinan , Plélan-le-Petit, Ploubalay regroupés dans l'association « Armor-Espéranto » ; Plouézec.

• **Finistère** : Landerneau, (et 6 membres individuels à Quimper et dans le reste du département)

• **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Montfort, St Malo

• **Morbihan** : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient. À noter aussi un nouveau club à Pluvigner, non membre formellement de la FEB mais en relation avec ses membres.

Tous les adhérents de ces groupes sont aussi adhérents de notre Fédération, qui y bénéficient d'un tarif préférentiel. Il faut y ajouter les membres individuels.

NOMBRE D'ADHÉRENTS 2016 : 192 cotisations (194 en 2014, 191 en 2015). Avec le détail : indépendants hors Bretagne: 6, indépendants Bretagne 6 (tous du Finistère), Vannes 30, Hennebont 13, Lorient 11, Plouézec 20, Landerneau 3, Saint-Malo 7, Armor-Espéranto 72, Rhuys 5, Rennes 19.

ACTIONS DE LA FÉDÉRATION

Édition de la Verda Triskelo,
2 fois par an (rédacteur Jannick Huet)

Internet

• **Gestion du site internet:**
<http://bretonio.esperanto-france.org/> de la Fédération par Bert Schumann et Xavier Godivier
 • Gestion des inscriptions et de la modération de la liste de discussion de nos membres
bretonio@yahooogroupes.fr par quatre bénévoles.

Organisation de tournées de conférences d'étrangers assurée par Josette Ducloyer :

Raporteto 2016 pri la rondvojaĝo de Aleksandro Melnikov tra Bretonio de la 24a de februaro ĝis la 24a de marto 2016 :

• La Ruso Aleksandro Melnikov vizitis 12 lokojn: Montfort, Rennes, St Malo, St Brieuc, Plouézec, Lannion, Le Juch, Hennebont, Vannes, Herbignac, Nantes kaj St Aignan-de-Grand-Lieu. Li prelegis 9 foje, vizitis lernejojn, en liceo kaj MJC, klasojn pri la rusa... Ĉiufoje estis granda sukceso.

• En Pluezek, eĉ aperis artikolo en la ĵurnalo Ouest-France pri lia prelego.

Vojaĝkostoj repagitaj de la FEB: 410€ .

Raporteto 2016 pri la ekspozicio pri la unua mondmilito

En Saint-Brieuc, tiu ekspozicio estis prezentita en junio 2016 en 2 liceoj de la urbo. Post tiu prezento la dokumentistoj de la 2 liceoj proponis prezenti E-on. Tiu prezento okazis en unu liceo la 10an kaj 15an de novembro.

Ni pruntedonis unu ekzempleron de la ekspozicio al la klubo de Arras. Ĝi estis prezentita de la 3a ĝis la 15-a de oktobro 2016 en Universitata Biblioteko de la Arras-a Universitato.

Ni pruntedonis la trian ekzempleron al la klubo de St-Aignan-de-Grand-Lieu, kiu prezentis ĝin al siaj lernantoj kaj projektas publikan prezenton.

Venontaj rondvojaĝoj

En 2017, la FEB organizas du rondvojaĝojn:
 La Rusino Svetlana Smetanina rondvojaĝos tra Bretonio de la 26/02 ĝis la 22/03 en 14 lokoj: Rennes, Montfort, St Malo, St Brieuc, Plouézec, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Loudéac, Vannes, Sarzeau, Herbignac, St Nazaire, Nantes. Ŝi prelegos pri la nuntempa Rusio.

La Brazilano Guilherme Fians rondvojaĝos de la 25^a de februaro ĝis la 4^a de marto en St Brieuc, Lannion, Douarnenez, Hennebont kaj Rennes. Li prelegos pri Brazilo kaj ankaŭ laŭ la deziro pri antropologio kaj sociologio, siaj fakoj.

F e d e r a c i o (s e k v o)

Rapport financier 2016

Débits exercice			2016	2015	Crédits exercice			2016	2015
Frais de fonctionnement			184,37	230,22	Cotisations des clubs		1431,74	1293,00	
Edition Verda Triskelo			375,17	478,61	Cotisations individuelles		216,00	184,00	
Frais AG Loudéac			125,70	125,70	Ventes de livres et CD		0	15,00	
Frais de déplacement			82,00	85,00	Subv. Ville de Rennes		177,00	192,00	
Remb. frais d'examen			280,00	763,11	Part. de clubs extérieurs		50,00	0	
Assurance			57,39	56,39	Retour Eo France		0	100,50	
Voyage (Melnikov)			410,00	189,80	don		0	38,00	
Total			1514,63	1928,83	Intérêts bancaires		36,18	42,83	
					Total		1910,92	1865,33	
Produits constatés d'avance			0						
Charges constatées d'avance			312,97						
Compte de résultat									
Dépenses			-1514,63	-1928,83					
Recettes			+1910,92	+1865,33					
Excédent/Déficit			+396,29	-63.50					
Trésorerie									
Solde compte chèque			1038,16	991,02					
Solde livret Bleu			4859,64	4823,45					
Solde caisse			0,00	0.00					
TOTAL			5997,80	5814.48					

La 3an de marto, haltis en Rennes la juna brazilana esperantisto Guilherme Fians, kadre de rondvojaĝo organizita de Josette Ducloyer nome de la bretona federacio.

Post la vizito de la malnova urbocentro, li estis en la klubejo de Rennes, kie kunvenis dek esperantistoj por renkonti lin.

Unue okazis komuna pikniko, en kiu la partoprenintoj povis demandi pri Brazilo kaj la fako de Guilherme.

Li estas 26a jaraĝa kaj doktoriĝas pri socia antropologio en la Universitato de Manchester (Britio). Li elektis kiel studobjekto de sia doktoriĝo "la parizanaĵoj esperantistoj", kaj do, post du jaroj da studado en Manchester, vivas 6 monatojn en Parizo por intervjui la homojn, partopreni la kunvenoĵojn de la parizanaĵoj esperanto-asocioj. En septembro li revenos al la Universitato de Manchester por verki sian tezon. La doktoriĝo entute daŭras 4 jarojn.

Li ĵus rondvojaĝis tra Francio dum 3 semajnoj kaj en Bretonio unu semajnon por prelegi, ĉu pri sia lando Brazilo, ĉu pri antropologio.

En Rennes, la klubo elektis la subjekton "antropologio" kaj ni kun granda intereso aŭskultis la prelegon.

Antropologio estas studado pri la homo kaj liaj kulturaj kaj sociaj aspektoj. Laŭ la landoj la studoj estas malsimilaj. En Francio, antropologio, etnologio kaj sociologio estas apartaj fakoj sed ne en Usono (ene de la fako estas ankaŭ lingvistiko kaj arkeologio) nek en Britio (la fako nomiĝas socia antropo-

logio) Historie antropologio ege evoluis.

1- Unue ĝi estis oficeja antropologio, surbaze de raportoj de misiistoj kaj surlokaĵoj esploristoj

2- Poste ĝi fariĝis bazita sur kampo-laboro

2-1 Ĝi priskribis pri la "sovaĝaj popoloj" kiel "infaneco de homaro": estas la "balkona antropologio": la antropoloj ne vivas surloke kaj havas rolon dum la koloniigo de Afriko: kunporti "la civilizaciön" al "sovaĝaj" homoj kaj ekspluati la resursojn

-2 Poste oni komencis konsideri la vidpunkton de la indiĝenoj.

Sed dum la 2a mondmilito la rolo de antropologio estas denove hontinda, ĉefe en Usono: oni studas la kulturon kaj socion de la malamikoj por plibone batali kontraŭ ili. En la post-koloniista antropologio, la antropologoj vivas kun la homoj "studataj" sed foje ne diris, ke ili estas kvazaŭ "spionoj" kaj publikigis sian verkon sen informi la homojn "spionitajn" Ĉu antropologio estas utila scienco? Antropologoj povas esti dungitaj de firmaoj por scii, ĉu investaĵo povas okazi sen damaĝe kaj esti akceptita de la loka loĝantaro (ekzemple, baraĵo, flughaveno...). Antropologoj povas agadi kontraŭ diskriminacio... kaj montri, ke Esperanto havas sencon! Post la prelego, Guilherme vojaĝis al Montfort-sur-Meu, kiun li vizitis la morgaŭon antaŭ ol reveni al Parizo.

Josette Ducloyer

Prelego de Guilherme



La 27an de Februaro, en St Quay Perros (22), okazis esperanta prelego pri la nuna Brazilo. Guilherme Fians estas juna brazilano kiu naskiĝis en 1990 en Rio de Janeiro. Li fariĝis esperantisto en la jaro 2009 kiam iu donacis al li, librojn skribitajn en tiu stranga lingvo : ESPERANTO.

Li, nuntempe loĝas en Parizo kaj studas en universitato por doktoriĝi pri socia antropologio.

Brazilo estas la kvina plej granda lando laŭ tersurfaco kaj laŭ la nombro da loĝantoj. Pli ol 200 milionoj da personoj loĝas en lando kies grandeco estas deksepoble tiu de Francio. Guilherme klarigis ke la historio de Brazilo ekis kiam portugaloj maristoj 'malkovris' Brazilon en jaro 1500. Laŭ la antropologia vidpunkto tiu komenco de la lando kaj multaj konataj stereotipoj pri Brazilo estas pli ĝuste legendoj ol veraj faktoj :

Brazilo ne naskiĝis en 1500. Kompreneble estis tiutempe multaj indiĝenaj popoloj kiuj vivis en Brazilo kiam le portugaloj eniris la landon.

Oni ofte diras ke Brazilo estas granda miksaĵo inter indiĝenaj popoloj, portugaloj kaj afrikanoj kaj ke tiu diverseco naskis la nunan brazilan kulturon. Jes ja, sed oni ankaŭ forgesas ke tiuj diversaj popoloj, fakte, ĉiam interbatalis, ofte perforte, kiam la etnoj estis vere malsimilaj. La eŭropanoj ekspluatistis la varojn de la lando por riĉiĝi. Unue oni ekspluatistis lignon kaj poste oron kaj kanon por fari sukerojn. Ne estis sufiĉe da indiĝenoj por labori, tial oni enirigis per velŝipoj multajn nigrojn. Ĉiam okazis tiutempe gravaj luktoj sed la tempo faris ke la vicaj generacioj pli kaj pli miksiĝis kaj ke la diferenco inter la etnoj malgrandiĝis.

Nuntempe, Brazilo estas la plej grava lando kiu ankoraŭ akceptas enmigrintojn kiuj eniras la landon nur pro ekonomiaj aŭ naturaj kialoj (Haitoj, Azianoj, ...)

Koruptado en Brazilo ĉiam ekzistis, ekzistas kaj ekzistos. Ne eblas nuligi koruptadon en tiu grandega lando. Geprezidentoj Lula & Dilma Russef forte kaj iomete efike klopodis por malpliigi la grandan malriĉecon de multaj loĝantoj. Tamen ili ne sukcesis (..., as, os !) nuligi ĝin. Dekstraj politikistoj sukcesis uzi la malkontenton sed ĉefe la fakton ke mono vere mankis en la lando por prezidentigi Miŝel Temer. Laŭ Guilherme, la nuna prezidento ege malkontentigas la brazilanojn pro ekonomiaj kialoj kaj li malvenkos la venontan baloton. Tamen liaj nunaj politikaj agadoj jam nuligis multajn rajtojn de indiĝenaj popoloj.

La prelego de Guilherme estis vere tre interesa ĉar la nuna politika tempo en Eŭropo multe similas al tiu kiun la brazila popolo jam travivis . Grekio aŭ Hispanio & Portugalio spertis ekonomiajn krizojn kiuj multe similas al tiuj de brazilaj ŝtatoj 'Rio de Janeiro' kaj 'Espirito Santo'. Bonŝance, la brazilanoj havas gravan trezoron kiu ĉiutage helpas ilin por trovi solvon por sin elturniĝi : LA ESPERO !!

Finfine ni demandis al Guilherme kial estas sufiĉe multaj esperantistoj en Brazilo, tiu grandega lando kie ĉiuj parolas la saman lingvon. Li klarigis ke Spiritismo & Esperanto estas ligitaj de historiaj faktoj sed ankaŭ de sufiĉe samaj espero por la estonteco. Sen spiritisma vidpunkto, ne ekzistus Esperanto en Brazilo. Estas fakto Sed estas ankaŭ fakto ke inter Spiritismo de Brazilanoj kaj inter Homaranismo de Zamenhof, ne estas tiom da diferencoj .

Koran dankon al Guilherme por lia prelego. Ĉirkaŭ 25 personoj ĉeestis la prelegon. Kelkaj el ili ne estis esperantistoj kaj ĝuis ĝin. La aliaj fieris ke Esperanto permezas pli bone kompreni sen juĝi la aliajn kulturojn.
Jc Dubois – "Esperanto Solidareco" (kreita de Gaby & Nikol) en St Quay Perros

Eo Vannes

FRANÇOIS RANDIN en kurso pri filozofio en Vannes!



Ni ne kutimas enŝoviĝi en liceajn klasojn de nia urbo, sed tamen François kaj mi estis bonege akceptitaj de du instruistoj pri filozofio kaj iliaj lernantoj de fina klaso, lundon la 26-an de septembro 2016.

Ĉi renkontiĝo okazis kadre de la programo pri lingvaĵoj en filozofia klaso, kaj dank'al Charline Griffon, nova profesoro en la liceo Lesage de Vannes, kies patrino estas esperantisto en Belfort.

Entute cento da lernantoj, dum dufoje unu horo kaj duono, aŭskultis klaran prezentadon de Esperanto far François.

Iuj ŝajnis interesataj, la aliaj dubemaj. François vekis ĉe pluraj scivolemon kaj motivon al pli da informoj (tiuj metis demandojn). Sed almenaŭ ĉiuj aŭdis pri kio estas Esperanto kaj espereble ili neniam plu disportos stultaĵojn pri ĝi !

François estis intervjuita de ĵurnalistino de *Le Télégramme*.

Vespere okazis la publika prelego de François Randin en domo de la societoj de Vannes. Ĝi kuniĝis 23 homojn, kiuj krom unu komencontino, estis jam konvinkitaj de la granda valoro de Esperanto.



Amika manĝo chez Manjo kaj Denis-Serges kun François kaj klubanoj

La pomoj

La pomo de la malkonkordo



Tiu rakonto komenciĝas kiel popola teatraĵo, kun la edziĝfestoj de la reĝo Pelée kaj de la nimfo Thétis. Zeus invitis ĉiujn diojn de Olimpo, krom Eris, diino de la malkonkordo. Por sin venĝi, Eris ĵetas inter la invititojn, oran pomon el la Hespérides ĝardeno sur kiu estas skribita : « Por la plej bela virino ».

Tri diinoj kverelas por gajni la frukton. Hera, diino de la ĉielo kaj de la geedziĝo, Athena, diino de la saĝo kaj de la artoj, kaj Aphrodite, diino de la amo. Tiam, Zeus vokas la paŝtiston Pâris (la filo de Priam, reĝo de Troie) por ke li esprimu sian prijuĝon. Por venki, Hera promesas al Pâris potencon kaj riĉecon, Athena, fortecon kaj kuraĝon, sed Aphrodite promesas la ĉiaman amon de la belega virino Hélène (jam edzino de Ménélas, reĝo de Sparte). Pâris elektas Hélène kaj forrabas ŝin. Estas la kialo kaj la komenco de la milito de Troie, kantiĝita de Homère en la Iliade.

(Ĉisupre « Pomo » de Magritte)

Hodiaŭ, en multaj lingvoj, la pomo de la malkonkordo elvokas kverelan aŭ dividan temon.

*Pierre, Ninette, Jeanine, Martine
el la grupo de Lorient*

La pomo de la arbo de ĉiuj sanktuloj

Heredanto de la keltaj tradicioj kaj ponto inter du mondoj, la pomo troviĝas en la centro de solenaĵoj pri la forpasintoj. Tiuj festoj okazas nur en Plougastel Daoulas, proksime al Brest, fine de Bretonio. Origine, Plougastel kaj ĝiaj 157 vilaĝoj, disemitaĵ ĉirkaŭ ok kapeloj, dividiĝis en teritoriojn kiuj samvaloras kiel eks-klanoj (Breuriezhou en la bretona).

Ĉiu teritorio (Breuriez de Breur=frato) organizis la unuan de novembro, la aŭkciadon de la arbo de la pomoj. Ĉe la pintoj de la arbobranĉoj (ofte takuso aŭ sendornigita ilekso) estis fiksitaj pomoj, el kiuj la plej bela kronigis la supron.

La profitoj utilis por pagi diservojn por la mortintoj.

Intertempe la tradicio iom post iom perdiĝis. Feliĉe en la jaroj 1980, ĝi renaskiĝis sub la formo de folkloro festo.

Alia tradicio en Bretonio : Pomoj kontraŭ ŝtormoj. Por forŝovi ŝtormodanĝerojn, estis rezervitaj du ĝemelaj pomoj kiuj konservis ligan de unika pedunklo sur la arbo. Tiuj pomoj estis supozataj protekti kontraŭ ŝtormoj.

*Pierre, Ninette, Jeanine, Martine
el la grupo de Lorient*

Armor-Eo , Plouezec

SUKCESA KUNVENO

La 10an de Januaro, okazis la reĝa kuko en la klubo de Pluezek. Multaj ĉeestantoj partoprenis tiun feston. Estis bona okazo por interkonatiĝi kun la diversaj anoj de la departemento : Pleudaniel, Guingamp, Peumerit Quintin, Lannion, Saint Briec.

Ĉiuj, en amika etoso, frandis la kukon, la kafon kaj la saŭman cidron. Ĉiu multe babilis pri siaj klubaj agadoj kaj ankaŭ pri la venontaj Pluezekaj Renkontiĝoj, kiuj okazos de la 14a ĝis la (entenata) 20a de aŭgusto.

Tiuj, kiuj konis Hélène Caous, emocie memoris ŝian sindoneman laboron dum pluraj jaroj, ene de nia grupo.

La pluezeka grupo.



Pri la du lastaj VT :
Nek unu frazo, nek unu vorto...
Kiam ni ne plu parolas pri niaj forpasintoj...
Tio signifas ke ni forgesas ilin....
« Faŭkbato je la Helena modo »
Ŝia nevino Maryvonne
Dankon por ŝi aperigi tion en VT 42 kaj ĝis Loudéac

ĈU LA INFANOJ DEVAS ĈEESTI AKUŜON ?

Pro elektro paneo , la ambulancisto petis « Zoe(n), filineton 4 aĝan, teni poŝlampon direkte al ŝia patrino, por pli bone helpi la naskiĝon de ŝia frateto : Petro.

Kun granda atento, Zoe plenumis sian taskon. Ŝia patrino puŝadis, ekpuŝis kaj post momento, finfine la bebo naskiĝis.

La ambulancisto, per la piedoj , suprenlevis la bebon kaj frapetis lin sur la pugon. Tuj Petro ekploris...

La ambulancisto dankis Zoe(n) pro ŝia helpo kaj demandis ŝin :Kio surprizis vin rilate al tio, kion vi ĵus vidis? La eta filineto tuj reagis : Li bone meritis frapon sur la pugovangon ! neniam li devintus eniri tien !

PLUEZEK ESPERANTO.

Nia venonta pikniko okazos dimanĉon la 25an de Junio. La loko ne estas ankoraŭ elektita, ni sendos pli precizajn informojn poste. Bone memoru tiun daton !

Esperanta semajno en mezlernejo



De la 27a de februaro ĝis la 3a de marto okazis **Esperanta Semajno** en la mezlernejo Jacques Prévert en Guingamp, kie mi instruas.

Unue, ekspozicio pri Esperanto videblis en la librejo (6 paneloj faritaj de asocio Armor Esperanto). Tie, infanoj malkovris la lingvon kaj povis respondi kvizojn duope. Pli ol 60 personoj metis siajn respondojn en skatolon.

Lunde, brazilano Guilherme venis tagmeze kun Jade, junulino en civita servo por Armor Esperanto. Li prezentis sian landon al Esperanta klubo, 12 partoprenantoj ĉeestis. Li montris arkitekturon de diversaj kvartaloj, tiam li ricevis interesajn demandojn pri kolonizado.

Fine de la semajno, Svetlana el Moskvo prezentis Esperanton al scivolemaj infanoj kiuj plenigis la kvizojn dum tiu speciala semajno. Ili venis multnombraj duonhoron tagmeze, pli ol 30 sidante sur foteloj aŭ tapiŝo en la librejo.

Post tiu ĉi agrabla momento, Svetlana elvokis rusajn simbolojn kaj aldonis klarigojn pri feltbotoj, samovaro aŭ vaporbanejo.

Dank' al tiuj turneoj en nia regiono, multaj lernantoj malkovris ne nur Esperanton sed ankaŭ komprenis, ke mondscale eblas elturniĝi pere de tiu ĉi lingvo.

Murielle Caré

Bretona humuraĵo

AL LOA-GOAD ER VOLENNAD
LÊZ

Ifig Lagadeg a zo laouen, soñjit 'ta e-neus kavet labour e kêr da werza mekanikoù da wriad. Setu, anad deoh, 'ez eus lorch ennañ. Kontant eo, ha koulskoude n'eo ket kontant a-walh. Eun draig a zo oh ober nehamant dezañ.

Ya, bremañ, gand e vicher nevez, e ranko chom aliez da loja en diavêz hag Ifig, siwaz, n'e-neus ket kalz a fiziañs en e wreg ! Fantig a zo eur penn-skañv hag Ifig 'n'eus aon e vije skañv he garr ivez... Kredi 'ra e vez gwazed all o weled anezi pa ne vez ket er gêr... 'Fin, n'eo ket sur a-walh, med kazimant... ha penaoz gouzout ivez?

Penoaz e rit-c'hwi, gwazed ? Petra 'pije greet e plas Ifig? Mad, selaouit petra 'reas on den. Setu petra ijinaz goude beza torred e benn o klask. A-raog mond kuit euz e di, e lak-eas, dre guz, eur volennad lêz dindan ar gwele, just e-kreiz hag a-zioh ar volenn, speget ouz ar somier, eul loa-goad.

- " Evel-se, emezañ, e ouezin ma vez bet daou o loja er gwele".

- "Ya, ma vez va gwreg he-unan e barz, he fouez ne vezo ket a-walh da lakaad al loa da zisken beteg al lêz.

Med, ma vezont daou er gwele, ar somier a wano dindan o fouez hag al loa a deuio da zouba el lêz. Da houde, pa deuin d'ar gêr, n'em-bezo nemed selled pe vo roud al lêz war al loa-goad pe ne vo ket, hag e vezo sklêr an traoù".

Pa deuas d'ar gêr e yeas buan, anad deoh, da zelled dindan ar gwele, ha petra 'gavas?

Eur volennad amann!!

Fonto : "Historioù farsuz" Naig Rozmor

UNE CUILLERE DE BOIS DANS
UN BOL DE LAIT.

Ifig Lagadeg est joyeux, pensez donc, il a trouvé du travail en ville : vendre des machines à coudre. Le voilà, je vous le dis, plein de fierté ! Il est heureux et, cependant, pas tout à fait satisfait.... Un détail le chagrine.

Oui, maintenant avec son nouveau métier, il devra souvent, longer hors de chez lui, et Ifig, hélas, n'a pas trop confiance en sa femme ! Fantig a la tête légère et Ifig a peur que la cuisse le soit aussi.... Il doute que certains hommes lui rendent visite quand il n'est pas là.... Enfin, il n'en est pas tout à fait sûr, mais presque.... Et comment en avoir le cœur net ?

Que ferait un homme honnête ?

Qu'auriez-vous fait à sa place ?

Bon, écoutez le conseil, à Ifig, d'un homme avisé. Voici ce qu'il imagine après s'être creusé la tête !

Avant de quitter la maison, il met, en cachette, un bol de lait sous le lit, juste au milieu, et, au-dessus du bol, attaché au sommier, une cuillère en bois.

"Ainsi, dit-il, je saurai s'il y a une personne, ou deux, à coucher dans le lit.

Oui, si ma femme y est seule, son poids ne sera pas suffisant pour que la cuillère trempe dans le lait.

Mais, s'ils sont deux, le sommier s'affaissera sous leurs poids et la cuillère viendra à tremper dans le lait. Ensuite, quand j'arriverai à la maison, il me suffira de voir, s'il y a, ou pas, des traces de lait sur la cuillère, et pour sûr, les choses seront claires ! "

Quand il arrive à la maison, Ifig s'empresse, croyez-moi, d'aller voir sous le lit, et que voit-il ?

Un bol de beurre !!

LIGNA KULERO EN BOVLO DA
LAKTO .

Ifig estas ĝoja, fakte, li trovis laboron ĉe la urbo : vendi kudromaŝinojn. Jen li, kredo min, plena je fiereco ! Li feliĉas, sed tamen, ne tute... ĉagrenas lin detalo.

Jes, nun, pro sia nova laboro, endas al li ofte loĝi ekster sia hejmo, kaj li ne tro fidas sian edzinon ! Fantig havas flirteman kapon kaj Ifig timas ke ankaŭ estu la gambo.... Li ja dubas, ĉu iuj viroj vizitas ŝin, kiam forestas li?

Fakte, li ne tute certas, sed preskaŭ.... Kaj, kiel scii la tutan veron?

Kion farus honestulo ? Kiel kondukus vi anstataŭ Ifig ?

Bone, aŭskultu la konsilon de sagaca viro al Ifig. Jen kion li imagas post granda cerbumo !

Antaŭ forlasi sian hejmon, kaŝe, li ŝovas bovlon da lakto, mezprecise, sub la liton, kaj super la bovlo, ligitan ĉe la somiero, lignan kuleron.

Tiel, sciiĝos la vero : ĉu, unu aŭ du personoj kuŝas en la lito ?

Fakte, se sola kuŝas mia edzino, ŝia pezo ne sufiĉos por mergi la kuleron en la lakton.

Sed, se ili gekuŝas, la somiero sinkos sub iliaj pezoj kaj la kulero enlaktiĝos. Poste, kiam mi alvenos hejmen, sufiĉos al mi rigardi ĉu estas laktospuroj sur la kulero, kaj plejcerte, klara estos la vero !

Kiam Ifig hejmen alvenas, kredo mim, li tuj direktas al la lito kaj kion li mire malkovras ?

Bovlon da butero !! Jeanne



Rakontoj

WOOOFanoj

Ekde kelkaj jaroj, Hubert kaj mi akceptas hejmen junulojn, kadre de WOOOFing, angla vorto kiu signifas : tutmondaj spertoj en ekologiaj bienoj (worldwide oportunities in organic farms).

Unue, ni sendis anoncon sur la retejon WOOOF, ni priskribis nian bienon (40 abeluoj, legomĝardeno, fruktarbejo). Junuloj kiuj interesas pri abelbredado respondas. Ni ricevas ĉirkaŭ 20 petojn ĉiujare, sed ni akceptas nur 5 aŭ 6 el ili. Sur nia anonco, ni precizis, ke ni povas gastigi esperantistojn, sed ĝis nun, neniu respondis.

Plejofte, tiuj junuloj estas fakte francaj junulinoj, sed ni ankaŭ gastigas eksterlandanojn. Ĝis nun, el Kebekio, Novzelando, Hispanio, Italio, Germanio, Brazilio, Usono. Kelkfoje venas paroj, aŭ eĉ virino kun siaj 2 filoj. Kelkfoje, ili ne plu estas tre junaj...

Ili helpas min dum mia laboro, ĉirkaŭ kvin horoj ĉiutage, kaj ankaŭ partoprenas la familian vivon, turismas, ktp.

Kompreneble, ni parolas al ili pri Esperanto. Kelkaj jam konas, sed neniu jam lernis. Mi proponas al ili, dum ilia staĝo, sekvi kelkajn lecionojn, ĉu hejme kun mi, ĉu dum miaj kursoj en Lannion.

Tiuj junuloj, kompreneble, tre rapide lernas. Ili ege facile memoras la prononcajn regulojn. Kiam mi havis komencantojn en Lannion, tiuj miris ke, en du aŭ tri lecionoj, la WOOOFanoj preskaŭ atingis la saman nivelon ol miaj gelernantoj, multe pli aĝaj, post 4 aŭ 5 monatoj.

Iun fojon, ni ricevis junulinon, Sarah, 18 jaraĝa, kiu estis superdotita (ŝi obtenis sian bakalorekzamenon je la aĝo de 16 jaroj). Ŝi finis la unuan libron de la Bekkurso post 5 tagoj, unuhoro ĉiutage !

Alian fojon, venis dum 15 tagoj junulo, Sebastian, el la supera franca lernejo Politekniko. Li ne volis laborigi nur sian cerbon, sed ankaŭ sian korpon. Li ŝatis manfaritan laboron. Bela filozofio !

Li ankaŭ multe interesiĝis pri Esperanto, pri la eksterordinara logiko de tiu lingvo.

Lastan jaron, ni ricevis paron, Isabelle kaj Da-

mien. Ili vivas laŭ la principoj de la sociala kaj solidara ekonomio. Ili tuj komprenis, ke Esperanto mirinde kongruas kun tiuj principoj. Ili rapide lernis la unuajn lecionojn de Esperanto kun mi dum printempo 2015, sed poste ne daŭrigis la lernadon dum unu jaro, pro tro da aktivaĵoj. Somere 2016, ili ĉeestis la Pluezekajn renkontiĝojn, kaj nun volas startigi kurson en Pluvigner, kie ili loĝas, en Morbihano. Mi deziras al ili bonan ŝancon en ĉiuj iliaj projektoj. Kaj bonvenon sur tiu tero al la bebo kiu ĵus naskis, kaj nomiĝas Oriane.

Mi ankaŭ ŝatus rakonti anekdoton, kiu ne temas pri Esperanto. Lastan someron, Hubert kaj mi serĉis iun por gardi nian domon kaj zorgi pri la hundo kaj la kato, dum 15 tagoj.

Iam, ni ricevis mesaĝon de germana WOOOFano el Tübingen, Marlis, kiu havis nian adreson pere de Vinko kaj Claudine. Fakte, Vinko laboris en Tübingen dum pluraj jaroj. Kaj ĉu vi scias ke, en tiu urbo, kiel en multaj aliaj de Germanio, oni instruas la bretonajn dancojn ?

Marlis renkontis Vinko-n kaj Claudine-n dum fest-noz (nokta festo en la bretona lingvo), en Tübingen. Ŝi estis ege simpatia. Ŝi ne parolis la esperantan lingvon, sed sufiĉe bone la francan. Ŝi venis per motorciklo, ŝi restis kun ni dum unu semajno por helpi nin kiel WOOOFano. Poste ni foriris kaj ni lasis ŝin zorgi pri la domo dum 15 tagoj. Ŝi multe profitis la somerajn festou-noz-ojn de la regiono, kaj ankaŭ turismis, promenadis, ktp. Ŝi reiris al Tübingen motorcikle, sed ŝi diris, ke estas la lasta fojo, ĉar ŝi ne plu estas sufiĉe juna por tiel malkonforta vojaĝo. Hubert kaj mi multe ĝojas gastigi tiujn volontulojn. Ili memorigas al ni la tempon kiam niaj tri gefiloj loĝis hejme. Ni ŝatas ilian entuziasmon, ilian freŝecon, ilian scivoleman menson. Ili alportas al ni grandan malfermon pri la mondo, riĉajn konversaciojn dum la manĝoj, kaj preciozan helpon sur nian bienon.

Maja

Rakontoj

Nova lernanto

Preskaŭ ĉiujare, Maja venas al la kurso kun junulo, kiun ŝi akceptas kiel « wwoofulo ». De tiu maniero, ŝi semas la grajnoj de Esperanto . Eble ili ĝermos.

Sed la pasintan jaron, ŝi alvenis kun stranga lernanto. Li estis juna kaj iomete moviĝema, li kuris tra la ĉambro, gustumis ĉion kion li trovis. Iom post iom, li iĝis pli obeema, li restis apud Maja,



observante ĉiun el ni. Iun tagon li rakontis sian projekton por la futuro : « Kiam mi estos plenkreskulo, mi volus helpi handikapulon », li diris, montrante sian pelerinon. Li ne estas « Batman » nek « Superman », li nomiĝas Laeron kaj estas hundo.

Ĝi estas edukata por esti akompananto de handikapulo en rulseĝo.

Jocelyne

Ĉu Aŭstralio estas nova lando

Antaŭ nelonge fremlandaj esperantistoj vizitis nian landon . Unu el ili en konversacio menciis ke Aŭstralio estas nova lando.Ĉu ankaŭ vi tion opinias? Je mia surprizo , li provis pravigi sin dirante ke almenaŭ la britoj tie ekloĝis antaŭ nur iom pli ol du cent jaroj. Iusence antaŭ la koloniizado de la lando, ĝi ne havis la nomon Aŭstralio.

Ĝuste estis ankaŭ la celo de la britoj kredigi ke la insulo estis nenies posedaĵo antaŭ ilia alveno.La kutima penso dum la tuta periodo de la politiko de ‘blanka Aŭstralio’ estis ke la aborigenoj certe ra-

pide malaperos.

Tamen estas sciite ke antaŭ 35 000 aŭ 45 000, aŭ eĉ 60 000 jaroj laŭ la fontoj, aborigenoj jam troviĝis sur la kontinento, kiu tiam ne similis al kia ĝi estas nun. Tiu vizitanto sciis tion. Kiel eblis kredi samtempe ke Aŭstralio estas malnova loĝloko kaj nova lando?


Kiel montras psikologoj homoj estas kredemuloj, kvankam ili scias ke aliaj homoj mensogas -fakte kvankam ĉiu mensogas iagrade,-ĉar bebo nepre devas fidi tiujn, kiuj pri ĝi zorgas .

Eŭropanoj konas la historion de la mondo laŭ la eŭropa vidpunkto. Pro tio vojaĝi kaj renkonti homojn de alia kulturo tiom gravas. La precioza ilo de esperantistoj por ordigi siajn konojn estas ĝuste Esperanto.

Sed ŝanĝo estas unu el la plej malfacilaj agoj, aparte ŝanĝi la pensojn, profunde kuŝantajn en la cerbo, sen ebleco kompreni kiel ekzakte ili tien penetris.


Kun salutoj el la alia hemisfero,

Franciska



Historio

SORBONNE PLAGE



Estas historio de feliĉaj ferioj de humaneca komuneco.

Ekde 1900, grupo de intelektuloj el la "Sorbonne", elektas kiel feriejojn, l'Arcouest(n), supre de la golfeto de Launay, fronte al la insulo Bréhat.

Ĉirkaŭ la historiisto Charles Seignobos, de la fiziologo Louis Lopicque kaj la fizikisto Jean Perrin, instaligatas kaj restadas, de generacio al generacio, la familioj : Curie, Joliot, Langevin, Borel, Auger, Pagès, Chavannes... Ili estas : fizikistoj, biologoj, kemiistoj, fiziologoj, matematikistoj, kuracistoj, art-historiistoj....

Ĉiuj, kunigitaj per iliaj pacistaj, politikaj, laikaj konvinkoj, estas "Dreyfusards"(1), militantoj ĉe la Ligo de la "Homaj Rajtoj" kaj subtenantoj de la "Popolfronto". Ili zorgas pri edukado kaj klerigado de la infanoj kaj atentis pri la sociaj virinkondiĉoj.

Ili estas konvinkitaj ke la Scienco enigis la Progreson.

En Parizo, pro sia laboro, ili jam interrilatiĝas. Ili posedas komunan, sciencan, kulture heredaĵon sed, tie, en l'Arcouest, la klano vivas en pli-malpli ferma reto.

Dum la feriaj monatoj, tiuj intelektuloj, multe ĝuas la vivon : ili sin banas, promenadas, marveturas, fiŝkaptas, diskutas, kantas kaj dancas.

Kutime, Seignobos, ((kromnomita Kapitano), enŝipigas siajn amikojn (la gepatrojn kaj la infanojn) sur sia velŝipo "l'Eglantine", kaj marveturas, de insulo al insulo, ĉirkaŭ Bréhat.

Louis Lopicque, fiziologo, unue malkovris l'Arcouest(n) kaj aĉetis terenojn, kaj poste, multaj el ili, tie, konstruigis domon : "Tachenn Bihan"(Seignobos), " Roc'h ar Had" (L. Lopicque), Jean Perrin, dank'al sia premio- mono, konstruigis grandan domon ("Ti Yann"), Marie Curie...

Dank'al la historiisto Seignobos, tiu sagao ekkomencas : tiu malavarulo gastigas la novajn ĉeestantojn ĉe sia granda, ĉiam malfermata domo.

Historio (sekvo)

En 1911, venas, unuafoje Marie Curie. Ŝi kaj ŝia filino Irène (nur 18aĝa), partoprenas la unuan mondmiliton. Sur la militfronto, per veturiloj nomitaj : "les Petites Curies", ekipitaj per radiologiloj, ili ebligas, (dank'al tiuj radiologiloj) la kuracistojn fari ĝustajn diagnozojn pri la vunditaj soldatoj.



La posteuloj de tiuj universitatanoj sekvas samajn studojn kiel siaj gepatroj, kaj siavice reprenas tiun kolektivan identecon. Pluraj geedziĝoj pliforte kunligas la diversajn familiojn. En 1926, Irène (filino de Marie kaj Pierre Curie) edziniĝas kun Frederique Joliot (ambaŭ Nobel-premiistoj en 1935). Nur tiu ĉi ligas kontaktojn eskster la grupo : li fiŝkaptas kun lokaj fiŝkaptistoj, partoprenas la lokajn velkonkursojn....

Ĉirkaŭ la jaroj 1930, la denseco de universitatoj kaj Nobel-premioj (4 : Marie Curie, Jean Perrin, Irène kaj Frédérique Joliot Curie) estas tiel ke, l'Arcouest estis nomata : Sorbonne Plage.

Post la unua mondmilito, dank'al la dua generacio, "l'Arcouest-epopeo" disvolviĝas ĝis la dua mondmilito. En 1936, la venko de la Popolfronto, firmigos la sociajn ideojn de la Arcouestanoj .

En 1939, la dua mondmilito disigas la grupon sed tamen, la infanoj restadas en l'Arcouest. Pluraj el la intelektuloj soldatiĝas kaj partoprenas la Rezistadon.

En 1940 la germanoj alvenas en l'Arcouest kaj detruas la boatojn. En Parizo, Paul Langevin estas enkarcerigita de la gestapo pro siaj kontraŭ faŝismaj opinioj. En 1942, Seignobos mortas en Ploubazlanec kaj Jean Perrin en Usono.



Ankoraŭ hodiaŭ, la posteuloj de tiuj familioj pluigas la tradicion kaj, ĉiam ferias en l'Arcouest la familioj : Perrin, Joliot, aŭ Lapicque.

Omaĝe al Irène kaj Frederique Joliot Curie, pro iliaj vivoj, dediĉitaj al la Scienco kaj la Paco, iliaj amikoj starigis monumenton en l'Arcouest.

En 2001, Paule Lapicque (filino de Augustin Lapicque) postlasas sian riĉaĵojn : 11 hektarojn rando de la marbordo al la asocio "Bretagne Vivante". Tiu testamentaĵo iĝos "la Réserve Paule Lapicque". Tie, oni konkretigas la ideojn de la donacinto : studi kaj protekti la naturajn mediojn

Jeanne. Plouézec.

EO KLUBO de Hennebont


La Torto de la Fraŭinoj Tatin



Kiu eltrovis la « Tatin-torton » ? Legendo aŭ realo, almenaŭ cirkonstanca ludo ? Ĝi ŝuldiĝis de sen-pripensaĵo de Stefania, kiu, kun la fratino Karolina, tenas la hotelrestoracion « Tatin » fronte al la stacidomo de la « Motte-Beuvron », en « Loir et Cher », en Solonjo.

Tiun dimanĉon, komence de la ĉasperiodo, fine de la XIXa jarcento, dum Karolina akceptas la multnombrajn gastojn, Stefania preparas la manĝon. Plenaktivece, senatente, ŝi enforigas sian muldilon. Kelkajn minutojn pli poste, ŝi ekkomprenas ke, ŝi nur enmuldilgis la pomojn. Tiam, ŝi decidas aldoni la paston super la pomojn. La Torto « Tatin » ĵus naskiĝis.

ATALANTE



Forlasita de la patro, Atalante estas bredita de ursino kaj kreskas en arbaro, adoptita de ĉasistoj. Fortika kaj alloga, ŝi distingiĝas en ĉasado, vetkurado, kaj arkpafado. Decidinte plu esti virgulino, ŝi tamen konsentas doni ŝancon al siaj svatiĝantoj. Ŝi edzigas tiun, kiu ŝin venkos vetkurante.

Nur Hippomene akceptas la defion, li gajnos dank'al tri oraj pomoj por li plukitaj de Aphrodite.

Ovide en « Metamorfozoj » rakontis :

La du konkurantoj rapidegas sur la dromo. Hippomene sentante sin venkota, forĵetas pomon en la arenon. Atalante kliniĝas, ĝin prenas kaj rapidegas. Ŝi preskaŭ lin atingas. Hippomene forĵetas la duan pomon en la arenon. Atalante kuras, ĝin plukas kaj kuratingas Hippomene, kiu, tiam, plifore forĵetas la trian pomon. Atalante hezitas sed ŝia deziro estas pli forta. Ŝi devojiĝas, plukas la rulantan frukton sed, malfruiĝanta pro la pli longigo de la vojo, estas venkita. Hippomene triumfas. Atalante fariĝas lia konkeraĵo kaj edzino.

Pierre, Ninette, Jeanine, Martine el Lorient

EO KLUBO DE HENNEBONT

La 13an de decembro 2016 ni kuniĝis por festi la 50an datrevenon de nia klubo « *VEKIĜU* ». Ni invitis niajn iamajn membrojn, la sinsekvajn prezidantojn de « Foyer laïque d'Hennebont » nia patri-na asocio, kies unu el la plej malnovaj fakoj estas nia klubo « *VEKIĜU* », fondita de Fred Le Magadure en 1965. Ankaŭ estis invititaj la membroj de la klubo de Lorient, kiun ni fondis en 2010. La lokaj ĵurnalistoj vizitis nin, fotis la partoprenantaron, kaj publikigis artikolojn.



Fred prelegis, kaj rememorigis la diversajn etapojn de la klubo, inter kiuj :

- Instruado en la lernejoj : eksperimento lanĉita de ILEI inter 1975 kaj 1977 kies konkludo estis la « Semajna internacia lernejo en Saint Gérard, Belgio,
- La restadoj en Greziljono, kun lernejoj kaj eksterlandaj partoprenantoj,
- La ĝemeliĝo inter Hennebont kaj Kronach, kaj la interŝanĝoj inter la du grupoj,
- La printempaj kaj aŭtunaj folioj, senditaj al niaj multnombraj korespondantoj,
- La akcepto de eksterlandaj prelegantoj.

Antaŭ ol konkludi, F Le Magadure omaĝis al du niaj antaŭuloj : Joseph Mariette, kapableculo en 1907, kies libroj troviĝas en nia biblioteko, kaj lia edzino, Marthe, kiu instruis Esperanton en lernejo, sekve al la cirkulero de la Ministro pri Instruado, Jean Zay, favora al Esperanto (11a de oktobro 1938).

Fred speciale dankis al sia edzino, Simone. Ŝia helpo ebligis parton de la aktivajoj, ekzemple la akcepto de eksterlandaj prelegantoj, kaj la vojaĝoj eksterlandaj, la infankongreseto en Rommey Marsh, la Internacia Lerneja Semajno en St Gérard (Belgio).

Ĉu Esperanto estas duonjarcenta en Hennebont ? Ne, ĝi estas pli ol jarcenta.

Martine Davoust projekciis kaj komentis bildojn pri tiuj eventoj.

Sekvis honorvino kaj komuna manĝo en agrabla etoso : du esperantistaj violonistoj, Françoise Noireau kaj Dédé Daië, gajigis la vesperon per siaj triloj.

Esperu ni, ke nia klubo pluvivos almenaŭ 50 jarojn !!

Viaj ĝeamikoj el Hennebont kaj Lorient.



Kelkaj anoj kaj eksa prezidanto de Foyer Laïque d'Hennebont



Fred kaj Simone Le Magadure kun la nuna prezidanto de F.L.H.

Teatraĵo

Prezidento alvenas hejmen! (teatraĵo)

Ĉetable en kuirejo, ĉiuj ludas (per kartoj). Subite, DRINGGG (bruega sonorilo pere de Jean-Claude, kiel sonefektisto)).

Martine : - « tio aparataĉo ĉiam ĝenas nin ! Ne respondu ! »

Daŭras la sonorilo...

Anne: - Prefereblas respondi, mi dekreĉas »

- « Alo ?

- Jes ja, mi estas Sinjorino

Dezormo. Prezidentejo de la Respubliko!

- Sendube vi blagas min!

- Jes ja, vi pravas. Vere, antaŭ tri monatoj, ni kandidatis per letero por inviti en nia hejmo nian Prezidenton. Tion mi forgesis.

- Nia familio elektita! La Prezidento Valerio Holando tuj vizitos nin! Kiam?

-Hodiaŭ, post lia vizito de uzino en Sant Briego

-Bone...Bone...Je kioma horo?

- Proksimume je la kvara hodiaŭ

- Jes, jes, kompreneble ni plezure akceptos lin. Ĉu li venos kun sia amikino Ĵuli Gajo?

- Sole kaj inkognite. Dankon. Saluton! »

Ŝi bazigas la telefonricevilon. La aliaj ĉetable gapas

- « Ĉu vi aŭdis? Prezidento Valerio Holando tuj vizitos nin.

Li alvenos hejmen post malpli ol unu horo! »

Ĉiuj : - Post unu horo !

Subite en la kuirejo febra ekszaltiĝo aperas.

Claudine : -« Priparu ni kvarhoran manĝeton! »

Oni elkolektas la kartludon. Ĉiuj surmetas antaŭtukon (+ ĉapon por Jean-Pierre)

Claudine : -« Okaze de tiu eksterordinara cirkonstanco faru ni nian grandegan mirindan kukon!! Kion ni bezonas? »

Martine: - Rigardu ni nian recepton.

Jean-Pierre turnas la unuan paĝon de la papertabulo. Sur la dua paĝo, estas skribitaj la ingrediencoj de la mirinda kuko. Li legas: faruno, sukero, butero, ovoj, ĉokolado, freŝa kremo, aveloj, migdaloj, oranĝoj)

Sed la sako de faruno estas preskaŭ malplena da faruno, li trastrekas « faruno » sur la tabulo; ne plu ovoj en la ovo skatolo, do li trastrekas « ovoj » ktp...

Finfine nur faruno (iomete!), sukero, butero...sed ankaŭ rulaĵo de folipasto kaj pomoj de la ĝardeno.

Claudine: - Eĉ tortpladon ni ne havas por fari torton!

Ĉiuj panikiĝas, krom la kuirestro Jean-Pierre, kiu tranvile prenas el la bakujo la plankon:

Jean-Pierre : - « Ne gravas, mi zorgas pri la folipasto. Senŝeligu kaj lameligu la pomojn! »



Finfine, la kuko kuiras en la bakujo.

Jean-Claude : - «Pretigu la tablon rapide ! Li ne plu malfruos ! »

(Jean-claude kiel sonefektisto)

Oni aŭdas motorciklan

bruon.

Martine : - « Li alvenas!! »...

(Jean-Claude, kiel sonfekisto)

Tok! Tok! Tok!

La Prezidento eniras, sian kaskon mane...

Anne : - « Eniru, Prezidento ! Ni akceptas vin plezurege ! »

Hubert (la Prezidento) : - « Dankon, karaj amikoj ! Mi vizitas vin tute simplece »

Anne : - « Sidiĝu, mi petas »

Hubert (la Prezidento) : - « Dankon ! Mi estas lacega... Vivo de Prezidento estas tro malkvieta ! »

Iu (Jean-Claude), iomete ridante : - « Ho, Prezidento ne devus diri tion ! »*

**titolo de la libro de F Hollande : « Prezidento ne devus diri tion » (sur la tabulo)*

Oni surtabligas kukon... ili manĝas... iu (Martine) ne manĝas ...

Hubert (la Prezidento) : - « tiu kuko estas tre bongusta... Vi ne manĝas ? »

Martine : - « Ne, mi ne povas....mi estas sen dentoj... »*

**laŭ V. Trierweiler, pri F. Hollande, malriĉulojn = sendentuloj*

Griziĝas la mieno de la Prezidento, kaj li rapide ŝanĝas la konversacion :

Hubert (la Prezidento) : - « Vi loĝas en bela regiono, tre verda »

Claudine : - « jes, pluvas iomete... »

Hubert (la Prezidento) : - « Ho, jes ! Mi scias ke kelkfoje, pluvegas forte ! Sed, ne gravas... »*

** oratorajo sur insulo Sein, sub pluvego (ilustrita sur la tabulo*

- « Miaj karaj sampatrianoj... la tempo flugas tro rapide, mi devas forlasi vin, ĉar mia agendo estas plena....Dankon pro tiu momento *...ĝis revido ! »

** titolo de la libro de Valérie Trierweiler.*

(Jean-claude kiel sonefektisto)

Oni aŭdas kelkajn notojn de Marseillaise...

Martine, pro la forgesita kasko kuras post la prezidento, kaj revenas.

Oni aŭdas motorciklan bruon.

La personoj, senvortdire, mane faras « ĝis revido »...

Oni aŭdas motorciklan bruon.

en Rennes

Prelego en Rennes

Ekde la 27a de februaro la rusino Svetlana Smetana, kiu vivas en Moskvo, rondvojaĝas tra Bretonio.

La 28an de februaro, en la klubo de Rennes ŝi partoprenis komunan piknikon kaj poste prelegis pri la hodiaŭa Rusio, kun bildoj pri la novaj konstruaĵoj inaŭguritaj de la nova urbestro de Moskvo en la urbo kaj de Putin' tra la lando, kaj kun kelkaj belaj bildoj pri la rusa kamparo.

Kvankam Svetlana montris iom tro da propagandaj bildoj pri Putin', la prelego estis interesa, kun multaj detaloj pri la progreso de la rusaj ekonomio kaj socio.

Ekzemple, en Moskvo (oficiale 15 milionoj da loĝantoj sed sendube multe pli), en 6 jaroj 13 novaj metroostacioj estis inaŭguritaj, kaj nun aera ringa metroo ĉirkaŭas la urbegon. En la metroo anoncas la staciojn por blinduloj (kaj aliaj...) vira voĉo de la eksteraj stacioj al la internaj kaj virina de la internaj al la eksteraj. Kial? Vira voĉo incitas al la laboro, virina al la reveno hejmen...

Ni spektis bildojn de novaj pontoj, ĉielskrapomegoj, gigantaj komercejoj... kaj eĉ de la nova kosmodromo "Vostochnij" situanta sud-oriente de Siberio, en la "Fora Oriento"

De 1999, ege altiĝis la salajroj kaj pensioj, ege malaltiĝis la inflacio kaj ŝtatŭldo, kaj pli bone vivas la homoj. Estas la kialo de la populareco de Putin'.

La rusaj junuloj pasigas sian tempon kun la poŝtelefono enmane kaj ne plu reale komunikas nek legas librojn.

Pri la esperanto-movado en Rusio kaj ankaŭ pri la lernado de la franca, Svetlana estas pesimisma, ĉar ĉiuj junuloj lernas la anglan kaj opinias, ke sufiĉas la angla kiel internacia lingvo.

Svetlana parolis pri kelkaj simboloj de Rusio. Kremlino ekzistas ne nur en Moskvo sed ankaŭ en ĉiuj rusaj antikvaj urboj. Tio estas fortikaĵo, kiu en Moskvo posedas 22 turojn.

Betulo estas saniga arbo ege ŝatata de la rusoj. Urso ne estas tiel danĝera kiel oni supozas kaj daŭre vivas en la taigo kaj "Fora Oriento".

En 2015 Svetlana partoprenis esperantorenkontiĝon en Krimeo kaj montris al ni kelkajn belajn bildojn pri ĝi.

En Rennes neniu aŭdacis demandi politike pri Rusio kaj Krimeo. ..

Josette



Bela Rhuys

Geografia loko elektita : tiu ĉarma duoninsulo de Rhuys

Dum somero 1996 mi vere malkovris tiun duoninsulon kun tiel vidindaĵojn kiel la enirejon de la Morbihana Golfo, liajn multajn insulojn, kiuj, laŭ la legendo, devenas de la larmoj de la feinoj de la arbaro de Broce-liande, la du havenetoj de Le Loĵo kaj de St Jako kaj multajn aliajn lokojn kiujn, nun, mi deziras pli priskribi al vi. Sekvu min : ek al la malkovro de tiu mirinda loko !...

Tiu duoninsulo situas inter la Morbihana Golfo kaj la Atlantika Oceano kaj, de tiu situo, profitas de mikroklimato kiu similas al tiu de la Ponantaj Insuloj : varmaj, sunaj someroj kaj dolĉaj, sufiĉe sekaj vintroj... laŭ la asertoj kiujn oni trovas en certaj geografiaj libroj !...

Ni iru tuj ĝis la ekstremaĵo de tiu duoninsulo per la ĉefa vojo kaj atingi Port Navalo. Tie estas unu el la plej belaj vidindaĵoj de la duoninsulo : la enirejo (kaj la elirejo) de la Golfo. 800 metrojn larĝa, 30 metrojn profunda, fronte de la kabeto de Kerpenhir, tie, la maro estas preskaŭ neniam trankvila. Vi juĝu : tie, dufoje tage la maro enfluas (kaj defluas) milionojn kaj milionojn da kubaj metroj da akvo kiuj generas, ĉefe dum meztajdo, imponajn kirliĝojn kiuj kapablas devojiĝi ŝipojn 10 metrojn longaj : maristoj estu atentemaj ! De tie vi malkovru ankaŭ la riveron de Auray kaj dekstre, la sonorilturo de Baden, la insuletojn Granda Huernig, Malgranda Huernig, Renaud, Granda Vezy, Malgranda Vezy kaj Longa Insulo (mi parolos pri tiu-ĉi lasta poste). Eble vi rimarkos altan, sveltan, blankan piramidon sur la insuleto Malgranda Vezy. Tiu konstruaĵo helpas la maristojn eniri en la Golfon : kiam ili alliniigas ĝin kun la sonorilturo de Baden, ili estas certaj eniri la Golfon sen danĝero. Se ni sinturnas pli dekstren ni ekvidas la havenon de Port Navalo malantaŭe de longa ĝeto kiu protektas la plezurŝipojn de okcidentaj ventoj. Nun ni povas piediri ĝis la pinto de Bilgroix fine de kiu staras statuo de Sankta Ana (patrino de Virgulino Maria). Dekstre de ni estas la bela strando de Treno kun ĝia flava sablo.

Ni daŭrigu nian promenadon kaj atingi la pinto de Monteno, fronte de la Longa Insulo. Tiu-ĉi insulo ofertas al la maristoj bonan ŝirmejon kontraŭ ĉiuj ventoj kaj mi memoras trapasi tie memorindajn noktojn... Per la pado de la doganistoj ni alvenas nun al la plaĝo de la fontoj ankaŭ nomita Nerbondik. Ĝi estas tute trankvila plaĝo ĉar malfacile atingebla per la veturiloj. Ĉu vi ne estas laca ? Do ni plu iru laŭlonge de la padoj. Jen estas la pinto de Pimbert sude de la insuleto Er Lanik. Ĉu vi vidas sur tiu ĉi insuleto starantajn ŝtonojn kiuj formas

cirklon ? Tio estas kromleĥo, megalitika monumento fare de la Keltoj, antikva popolo kiu vivis ĉi-tie antaŭ 3 aŭ 4 miljaroj. Malantaŭ tiu insuleto estas la insulo de Gavrinis sur kiu estas ankaŭ megalitika monumento : tumulo aŭ kairno. Mirinda afero estas ke onidiras ke dum la vintra solstico la sun radioj lumigas la fundon de la ĉambro de tiu-ĉi kairno. Bedaŭrinde mi neniam kontrolis tion... Poste, la golfeto de Berno vidiĝas la pinto samnome. Kaj nun, ni alvenu al la pinto de Kerners kie staras bela pinejo kiu tiel bonodoras dum somero...

De tiu-ĉi pinto ni vidas de sudo ĝis nordo, tri insulojn : Ten Hent, La Ĉevalino kaj Berder. Inter tiuj du lastaj impetegas la marfluo : dum meztajdo la rapideco de la fluoj povas atingi 18 kilometrojn hore. Etaj barkoj devas esti bone motorigitaj por kontraŭi tiun rapidecon ! Norde de tiu pinto de Kerners estas larĝa marspaco iom pli trankvila ol okcidente. La insulo Kreizik kion oni vidas antaŭ ni, estas fama ĉar kiam oni vidas ĝin de la pasejo de la Ĉevalino, ĝi aspektas kiel kuŝita drako aŭ dinaŭsoro kaj tio forte impresas la fremdajn turistojn... Kaj nun ni alvenas ĉe la ankrejo de Kerners kie restadas belaj velŝipoj. Alia flanko de tiu ankrejo estas la pinto Sankta Nikolaŭ. Ĉi tiu pinto prezentas apartan miraĵon kiu nomiĝas « barita sprono ». Tio estas arkeologita vorto kiu priskribas elstaraĵon da tero fare de la antikvaj popoloj, tri metrojn alta, 40 metrojn longa kiu protektas la loĝantoj de la fremdaj invadoj. Nun ĝi estas tute kovrita de arbaro tamen ankoraŭ videbla. Kiam vi atingas la fino de tiu pinto, fronte al vi, aperas la suda parto de la Insulo de Monaĥoj kaj funde de la sekvanta golfeto jen la tajda muelejo de Pen Castel. Kompreneble ĝi ne plu funkcias nun sed estas malfermita dum somero kaj akceptas muzeon...

Ni daŭrigu nian promenadon kaj sekvas la padon laŭlonge de la golfeto kiu tie nomiĝas : Le Pul. Tie, la maro eniras profunde en la duoninsulon, plie la istmo inter Morbihana Golfo kaj Oceano larĝas nur 1200 metrojn kaj altas nur 3 metrojn super la marnivelo. Tio signifas ke, kazo de subita subakviĝo fare de cunamo la ekstremaĵo de la duoninsulo de Rhuys iĝus kompleta insulo ! Ankaŭ notindas ke orienta flanko de tiu golfeto estas okupita de ostrokultivistoj kie eblas gustumi ostrojn altabligante sur teraso borde de la Golfo. Plie, tiuj ostroj tre bongustas ! Kaj nun ni alvenas ĉe la pinto de Le Loĵo norde de kiu situas la insuleto de Branek kaj dekstre la insulo de Govihan.

Bela Rhuys (sekvo)

Oriente de tiu pinto estas la ankrejo kaj la sola en- kaj el-ŝipiĝejo de la duoninsulo sur la Golfo ; grava afero ĉar ĉi tie, dum somero, amasiĝas la turismaj kaj feriantaj maristoj el ĉiuj regionoj !

Nu, post golfeto, pinto vi dirus ? Jes ja, kutime vi pravus sed nun vi malvenkis ! Fakte, tiu-ĉi pinto kiun vi vidas nun estas ankaŭ duoninsulo ! Jes: la duoninsulo de Brehuidik. Vidu, tie la tero larĝas nur 30 metrojn kaj altas nur 1 metron super la marnivelo ! Alia flanko vi malkovru Le Lindin, kiu estas kvazaŭ laĝeto funde de kiu staras ankaŭ iu malnova tajda muelejo. Ni estas tie tute proksime de la vilaĝo de Brillac . Kaj nun ni piediras norden ĝis la pinto de la Urso de kie ni aprezas la vidpunkton je la insulo de Stibiden. Tie la pasejo mezuras nur 230 metrojn kaj la fluoj impetegigas dum meztago, kvankam iomete malpli ol inter La Ĉevalino kaj Berder... Pli foren vi ekvidas la duan plej grandan insulon de la Golfo : la insulo de Arz kun ĝia pinta sonorilturo. Inter la insulo de Arz kaj la duoninsulo kuŝas tri insuloj : Ilur, Ilurik kaj Godek. Oriente de tiuj insuloj oni malkovras larĝan kaj trankvilan marspacon ĉar tie la fundoj malampleksas. Sed nun, mi iom timas lacigi vin per tiuj sinsekvoj de pintoj kaj golfetoj kiuj karakterizas la duoninsulon : vidu la mapon : post la pinto de la Urso estas tiuj de Bernon, de Bénance kaj ankaŭ duoninsulo de Truscat, la insulo de Tascon kion oni atingas nur dum malaltaj tajdoj ĉar dum aliaj momentoj ĝi estas tute ĉirkaŭata de la maro kaj finfine ni alvenas al la enirejo de la rivero de Noyal. Fu ! Ĉu ni povas spiri ? !! Insuloj, duoninsuloj, golfetoj, rokoj, pasejoj, istmoj, kiom kompleksa estas la Golfo ĉu ne ?

Tamen mia priskribo ne estas finita : mankas la Oceana bordo... Do ni forlasu la enirejon de la rivero de Noyal kaj iru suden kaj malkovru la pinto de Penvins. Vidu, tiu-ĉi loko ankaŭ estas mirinda ĉu ne ? La eta preĝejo de tiu duoninsulo (ankoraŭ unu) kun ĝia sesangula tegmento estas fama ĉe ĉiuj maristoj ĉar bone videbla de malproksime. Kaj de tie videblas la plej longa plaĝo de la komunumo : 4 km 500 m longa. Se ni rigardas okcidenten ni ekvidas, malantaŭ la dunoj, la altajn turojn de la kastelo de Suscinio situanta centre de la marĉoj. Tiu mezepoka kastelo estis restarigita de la bretonia regiono kaj de la departemento. Vi vizitu tiun imponan monumenton, ĝiaj tegmentoj estas aparte belegaj kaj ĝiaj salonoj luksaj. Tiu kastelo fierigas nun multaj bretonianojn kaj Sarzaŭ loĝantojn. Post tiu vizito ni trapasas laŭlonge de la strando de Roaligen kaj ni alvenas malantaŭ la haveneto de Sankta Jako. Tio estas bona ŝir-

mejo de la okcidentaj ventoj por la plezurmotorŝipetoj. Nun la padoj iĝas iom pli malfacilaj ĉar la plaĝoj estas anstataŭataj per pli altaj klifoj ĝis la kabo de Granda Monto kiu surstaras la maron je 30 metroj. Tie, oni bone vidas la Ponantajn Insulojn nome Hoedik, Huat kaj Belle Île kaj ankaŭ la duoninsulon de Quiberon [Kiberon] kiam la vetero estas bona kaj la aero pura. Nu, ni ĝuu la vidaĵon kaj ripozu dum kelkaj minutoj !...

Bone, ĉu tiu momento kuraĝigas vin ? Do, ni reprenu nian piediradon: nun la vojstreko malsupreniras iom post iom ĝis la bela plaĝo de Govelins kun ĝia blanka sablo kie la infanoj ĝoje ludas dum somero... Kiajn belajn memorojn ili provizas kaj enkapiĝas ĉi-tie ĉiujn jarojn!...

Ni lasu tiun plaĝon, trapasu kelkajn rokojn nomitaj Granda Rohu kaj denove longiĝas alian plaĝon: tiu de Kerver. Kaj vidu: norde de la dunoj, tiu larĝa areo estas nun golfludejo kiu flankiĝas la vilaĝeto Net kiu estas la plej mallarĝa loko de la duoninsulo kiel mi jam diris. Sed tie estu atentema: ne maltrankviliĝu la naturistoj kiuj svarmas ĉi-tie dum somero : Tumiak estas ilia vilaĝeto ! Ankaŭ kelkaj rokoj kaj denove bela plaĝo de Fogeo antaŭ la fama talasoterapio kiu estis starigita de fama bretona biciklisto Louison Bobet. Nun ĝi apartenas al Kataranoj. Kelkaj paŝoj ankoraŭ kaj ni alvenas sur la lastan vidindaĵon de nia promenado, mi parolas pri La Eta Monto. Ankaŭ tie estas spuroj kaj de la Keltoj kaj de la Germanoj. La antikva kairno estis fortigita de la Germanoj dum la dua mondmilito kaj estas vizitebla dum la someraj monatoj. De tiu vidpunkto oni bone vidas la havenon Le Kruesty kiu entenas centojn da plezurvel-kaj-motor-ŝipoj. Ĝi estas unu el la plej grandaj plezurhavenoj en Eŭropo...

Nu, post tiu tre longa promenado kaj atentema aŭskultado vi bone gajnis rajton vin bani antaŭ la Granda Plaĝo de Port Navalo ! Fartu bone kaj nepre ne dro-niĝu !!!

Francis



Agendo 2016



5 au 9 avril
Rencontre de la chorale
Interkant'
à
Grésillon.



Dates 2017
 ▶ 14 - 22 avril
 ▶ 10 juin KER
 ▶ 10 - 17 juillet
 ▶ 17 - 27 juillet
 ▶ 28/07 - 04/8
 ▶ 5-13 août
 ▶ 21 - 28 août
 ▶ 25/10 - 01/11



Le congrès français d'espéranto 2017 se déroulera **du 25 au 28 mai 2017** à Mandres-les-Roses (94), près de Paris.


Nous serons accueillis dans une structure résidentielle avec salles de réunions, hébergement, restauration et divertissements.

Le programme comportera des activités ouvertes au public.



69ème Congrès de
SAT-Amikaro

Saint-Sébastien-sur-Loire près de Nantes
15-18 avril 2017



En majo
HERBIGNAC-ESPERANTO PIKNIKO

25-a de junio
PLUEZEC-ESPERANTO PIKNIKO



Pluezeka Renkontiĝo 2016 pasis, vivu Pluezeka Renkontiĝo 2017 !

Pro komprenebla laciĝo de organizantoj venis la ideo, ke eble la 20a estus la lasta. Eĉ Armor-Esperanto ne trovis sufiĉajn fortojn por anstataŭi la viglan ĝisnunan pluezekan teamon, gvidinta de sia prezidanto Jean-Claude Dubois.

En novembro 2016, pluezekanoj instigis nin ĝis ni akceptis provi organizi 21an renkontiĝon. Post diversaj vizitoj kaj kunsidoj, post favora respondo de urbestro, nova teamo stariĝis en decembro. Duono venis el Pluezek-Esperanto, la alia el Armor-Esperanto.

Ni varme danku Marie-France Gouriou, Josiane Cadio, Laurent Peuch, Alain Bournel kiuj rapide trovis loĝejojn, instruistojn, manĝproponojn. Multaj aliaj helpis kaj plu helpos. Tial la 21a estas finpreta. Vi trovos aliĝilon ene de tiu ĉi numero de Verda Triskelo kaj ĉe Interreto.

Danke al efikeco de multaj, ni sukcesis konservi la saman malaltan prezon por la semajno, eĉ malaltigi la prezon de la manĝoj kvankam ilin preparos fama restaŭracio Coriandre el Trémargat (22).

Ĉi-jare Eŭropa Centro de Interkultura Edukado el Vroclavo, Pollando, fariĝos honora gasto de Pluezek 2017. Ses el ties membroj partoprenos, el kiuj tri gvidos kursojn aŭ poeziklubon. Nia eksa civita servistino Zsófia Pataki revenos el Budapeŝto por gvidi kurson al novaj aŭ falsaj komencantoj.

Por ricevi pliajn informojn, vizitu la retejojn armor-esperanto.fr kaj pluezek-esperanto.net aŭ skribu al pluezek@armor-esperanto.fr